Esperanto-Lingva Konversacia Rondo de Losanĝeleso
Diskuto-Temo por Decembro 2004

La Dankofesto

preparis Leston Buell

1. Demandoj

1. En kiu tago oni festas la usonan Dankofeston *(Thanksgiving*)?
2. Kio estas estas ĝiaj signifo kaj historio? Kiel vi tradukus kaj eksplikus la anglan vorton *pilgrim*?
3. Kiel oni kutime festas la Dankofeston? Kion oni manĝas?
4. Al kiu(j) ni estas dankemaj? Laŭ la tradicio, la Dankofestoestas religieca festo, en kiu oni esprimas sian dankemon al Dio. Tamen, ankaŭ nekredantoj festas tiun feston. Al kio aŭ kiu(j) ili sentas sin dankemaj?
5. Ĉu ekzistas en aliaj landoj aŭ en iu religio festo simila al nia Dankofesto?
6. Laŭ la tradicia historio, la unua Dankofesto en nia lando estis ankaŭ paca kuniĝo de Eŭropanoj kaj Indianoj. Kion vi opinias pri la tiamaj kaj nuntempaj rilatoj inter la Indianoj kaj la ceteraj Usonanoj?
7. Pro kio vi mem estas dankema?
8. Ni konscias, ke multaj mondanoj vivas en mizeraj kondiĉoj. Ĉu vi opinias, ke ankaŭ ili sentas dankemon? Ankaŭ ekzistas personoj, kiuj vivas en luksa komforto kaj tamen ne sentas dankemon. Kio instigas personon senti aŭ ne senti dankemon?

2. Utilaj Vortoj

meleagro: *turkey*

farĉi: *to stuff (a food)*

farĉo: *stuffing*

terpoma pureo, kaĉo el terpomoj*: mashed potatoes*

koloniano, kolonianto, koloniinto: *colonist*

setli: *ekloĝi, instali sin en nova loko, regiono aŭ lando*

refuĝinto: *refugee*